

FRANCA

PRIEURE SAINT-MARTIN
77610 LA HOUSSAYE EN BRIE
FRANCE

KATOLIKA ESPERANTISTO

★ Organo de FRANCA KATOLIKA ESPERANTO-ASOCIO, filio de I. K. U. E. ★
(Association Catholique Française pour l'Espéranto)

Prezidanto: S-ro A. BESSIERE 28, rue C. Saint-Saëns 76000 ROUEN
Sokr: F-ino G. PREUX 55/3 Rés. Terrasse Rue du 11 nov. 59290 WASQUEHAL
Kasistino: S-ino J. VINCENT 26 bis, rue Milngavie 49150 BAUGE
Religia konsilanto: P-ro L. BOURDON 7, av. Salomon 59000 LILLE
Peranto I.K.U.E: P-ro R. DEGRELLE 12, r. Estienne d'Orves 54490 PIENNES
C.C.P: Association Catholique Française pour l' Esperanto 2324 93 N ROUEN

==== la m^o: 8 F. Abono: 31 F (TTC). Kotizo: 9 F. Sumo: 40 F. ====

+++++

M.B. La materialon por la bulteno oni sendu al S-ino Vincent nepre
antaŭ la 5-a de februaro, majo, aŭgusto kaj novembro.

+++++

==== N^o 166. ==== BULLETIN TRIMESTRIEL ==== TRIMONATA BULTENO ====
*** Sankta PIO X-a, preĝu por ni. ***

==== SEPTEMBRO 1990 ====

+++++

LE MOT DU PRESIDENT

Avec l' arrivée de l' automne, notre association se prépare à de nouvelles activités et invite à nouveau ses membres à mieux cerner les deux buts qu' elle poursuit, à savoir vivre une foi toujours plus forte et active et, dans ce but, développer l' usage de la Langue Internationale.

Notre congrès de 1991 étudiera le rôle des espérantistes catholiques en tant que membres du laïcat chrétien. C' est un thème de réflexion important que nous nous devons d' approfondir tout au long de l' année, car nous nous voulons fils à part entière de l' Eglise et sommes en conséquence désireux de prendre notre part dans l' évangélisation de nos frères, proches ou lointains.

BILETO DE LA PREZIDANTO

Ĉe la alveno de aŭtuno, nia asocio preparas novajn aktivaĵojn kaj ree invitas siajn anojn pli bone konsideri la du celojn, kiujn ĝi alstrebas, nome vivi ĉiam pli fortan kaj aktivan fidon kaj, tiucele, disvastigi la uzon de la Lingvo Internacia.

Nia kongreso en 1991 pristudos la rolon de la katolikaj esperantistoj kiel anoj de la kristana laikaro. Tio estas grava pripensotemo, kiun ni nepre profundigu dum la tuta jaro, ĉar ni volas esti plenrajtaj filoj de la Eklezio kaj sekve deziras partopreni en la evangelizado de niaj homfratoj, proksimaj aŭ foraj.

A. B.

+++++

NEKROLOGO

Forpasis nia dojeno, André LHERBIER, 96-jara, kaj F-ino Remée MAUCHIEN, dumviva membro. Ni preĝu por la ripozo de iliaj animoj.

DIRAĴOJ EL CHIARA LUBICH (fino)

78. Kion fari, kiam oni amis supermezure? Plu ami.
79. Amu la proksimulon "kiel" vin mem. Vi estas via propra referenco. Se vi pretendus ami la proksimulon "pli" ol vin mem, vi irus kontraŭ Dio.
80. Ĉio estis kreita kiel donaco por vi, kaj vi kiel donaco por la aliaj.
81. Ekzistas pozitiva sinteno: pleniĝi per Dio; pli bone ol negativa: malpleniĝi je si mem. Subite, oni estas liberigita je siaj ligoj kaj je sia mio ne strebinte al tio.
82. Komune arigante niajn posedaĵojn, ni forigos la malriĉecon el ĉe ni. Ni ĉiuj ĝuos la esencan minimumon de la digneco.
83. Ĉia ideo estas respondeco.
84. Dio intervenas en niajn aferojn ĉiufoje, kiam ni tion deziras kaj kiam ni lasas al Li tiun eblecon.
85. Ne gravas! Vin ami gravas.
86. Nia programo: perpense kaj mersente transpasi la limojn metitajn de la homa vivo, kaj celi per akirita reflekso, al la universala frateco en unu sola patro, Dio.
87. Ni dediĉas al la unueco ĉiujn rimedojn de socia komunikado, kiuj ĝin instigas, disvolvas kaj konservas.
88. Jesuo instruis al ni du aferojn, kiuj estas nur unu: esti infanoj de unu sola patro kaj esti gefratoj unuj de la aliaj.
89. La amo fleksiĝas kaj ne rompiĝas.
90. La feliĉo estas harmonio kun la aliaj.
91. Necesas pli da spiriteco en la politiko, da kontemplado en la lukto, da saĝeco en la registaro, da unueco en ĉio.
92. Se ĉiuj evangelioj de la tero estus detruitaj, devus esti eble reskribi la Evangelion rigardante la kristanojn vivi.
93. La homo, kiu amas Dion estas diigita. Lia amo influas la sociom kun ties kutimoj kaj leĝoj. Li influas la paco kaj la kulturon. Li progresigas la homaron sur ĉiuj kampoj.
94. La naturo estas formita de evangelio, de dieco. Granda suno tute prilumas ĝin kaj donas al ĝi ĝian belecon.
95. Ĉar ili portas la nomon de Kristo, iuj fuŝkristanoj venigas malamon al Kristo kaj ties Eklezio. Ne vi tamen?
96. Vi neniam bezonas refari la agojn de viaj antaŭuloj. Ĉiu homo havas sian vojon. Dio neniam ripetigis.
97. Ĉu vi veturas por Dio? Multaj sekvas vin. Ĉu vi veturas por la homoj? Ĉiuj forlasis vin.
98. Jesuo avertis vin: "Ili malamis min, ankaŭ vin ili malamos". Prepariĝu al la monda malamo. Kaj se ĝi venos, tio estos bona signo.
99. En la mezo de nia interna universo, estu la belo-astro ĉirkaŭ kiu ĉio gravitas. Tiam, se ĉio dependas de vi, ho Dio, ne gravas kie kaj kiel, se kaj sed.

KRISTANOJ ESPERANTISTAJ

Okaze de la Nacia Kongreso, en Blois, grupo da kristanoj kunvenis en la Templo kaj en la Preĝejo S-ta Vincento.

En la Templo, kun Philippe Cousson, ili celebris la bibliam rakonton de Pentekosto, legante la 2-am ĉapitron de la Agoj de la Apostoloj, kaj vivigante la tekstojn per kantikoj bone elektitaj.

Kelkajm horojn poste, en la preĝejo tute proksime al la kastelo, kuncelebris la diservon de Dominikanoj kaj Unu Spiritano.

Kvindeko da kongresanoj entuziasme festis la alvenon de la S-ta Spirito. P-ro Héroux kantigis la ĉeestantaron, kum la helpe de la paroĥa orgemisto.

P-ro Bourdon reliefigis, ke por kredanto, la diskonigo de la Lingvo Internacia estas grava faktoro de komprenado, de justeco kaj paco.

Ni povas danki, ĉefe, la S-tan Spiriton, eternam amligilon inter la Patro kaj la Vorto. Li estas la unua fonto de ĉia amo inter la homoj.

La esperantistoj povas apogi sur Li sian fidon, des pli, ke la nuna mondo, kun sia senĉesa movado, estas la privilegia loko, kie ili povas kontribui al la paco kaj konkordo inter la popoloj.

L. BOURDON.

KONGRESO EN AMIENS

PROVIZORA PROGRAMO

- Vendredon: 26-an de aprilo: alveno posttagmeze
interkona vespero - kantezercado
- Sabaton: 27-am: matene prezentado de la kongresa temo - grupa studado
posttagmeze, vizito de la urbo, butikumado
diservo
vespere, lingvoekzercado
- Dimanĉon: 28-am: matene ĝenerala kunveno - komitatkunveno
posttagmeze vizito de la katedralo
diservo
vespere, ludoj
- Lundon: 29-an: matene, raportoj de la laborgrupoj
konkludoj pri la kongresa temo
posttagmeze, ekzamenoj
diservo
literatura vespero
- Mardon: 30-am: tuttaga ekskurso tra la "hortillonages"
diservo
distra vespero
- Merkredon: 1-an de majo: matene diservo
posttagmeze diservo

+++++

MANĜOKANTO

(laŭ la melodio "Au fond des bois, j' entends la voix du cor qui retentit")

Por tiu tag', por ĉiu pan'
Ni laŭdas vin, Sinjoro (2X)
Disdonu ni al ĉiu frat'
La amon de Jesu' (2 x)

+++++

SINJORO! JEN ESTAS MI!

Tio, kion mi petas de vi, Sinjoro,
me estas ĉion kompreni kaj ĉion fari.
Tio, kion mi petas de vi, Sinjoro,
estas malfermi mian inteligenton kaj mian koron
por ke mi povu aŭdi vian voĉon
kaj ke mi sciu rekoni vian vizaĝon.
Jes! Sinjoro, jen estas mi!
Tio, kion mi petas de vi, Sinjoro,
estas helpi min respondi Vian alvokon.
Jes! Sinjoro, jen estas mi!
Per la Bapto kaj la Konfirmacio,
Vi igas min vivi per Vi
kaj Vi instigas min esti travidebla
por ke Via vivo povu flori
em mi kaj por la aliaj.
Vi instigas min esti vivanta
en la Eklezio, kiu estas Via korpo.
Vi instigas min atesti pri Via amo en la mondo.
Jes! Sinjoro! Jen estas mi!
Per la sakramentoj, vi daŭre instigas min
oferi min kun Vi en la Eŭkaristio,
pardonu kiel vi pardonas min,
reakordigante min kun Vi.
Per la edziĝo, Vi vokas min al la amo, kiu beligas
kaj aperigas Vian amon al la Eklezio.

Kaj kiam mi malsanas, Vi instigas min
kuniĝi kun Vi por resanigi kaj savi la mondon.

Jes! Sinjoro, jen estas mi!

Vi vokas min, kiam mi forgesis Vin,
Vi vokas min dum mi neniam konis Vin.

Jes! Sinjoro, jen estas mi!

Vi instigas min, esti simila al Vi,
kiu estas ĉies servisto.

Vi instigas min

ankaŭ plene sekvi Vin en la konsekrita vivo.
Vi ankaŭ vokas min por esti, meze de la viaj,
tiu, kiu "agas Vianome" estante "sacerdoto".

Jes! Sinjoro, jen estas mi!

Sinjoro, faru, ke mi aŭdu la alvokon, kiun Vi sendas al mi.

Sinjoro, helpu min respondi: Jen estas mi,

kiam Vi diras al mi: Venu kaj sekvu min.

Jes! Sinjoro, jen estas mi!

KOTIZTABELO 1990

I.K.U.E. kun "Espero Katolika" 130 F
Peranto: P-ro R. DEGRELLE c.c.p. NANCY 2 555 38 L.

A.C.F.E. kun "Franca Katolika Esperantisto" - unuopulo 40 F
Geedza paro 50 F
Infano ĝis 16-jara, pastro, religiul(in)o 20 F
Bonfaranto 200 F
Dumviva membro 800 F

U.F.E. kun "Revue Française" kaj "E° Actualités" 230F
U.E.A. kun "Esperanto" kaj Jarlibro 225 F

Association Catholique Française pour l' Esperanto c.c.p. ROUEN 2 324 93 N.

ENHAVO

- | | |
|-----------------------------|------------------------|
| 1. Le mot du président | 4. La eŭropa standardo |
| 2. Fido | Reveno |
| La refleksivo | Kasistima angulo |
| 3. Diraĵoj el Chiara Lubich | 5. Kongreso en Amiens |
| Kristanoj esperantistaj | Sinjoro! Jen estas mi! |

Dépôt légal: 3ème trimestre 1990 !! Polycopié pour l' A.C.F.E. (enregistrée le 6
!! mai 1977 à la sous-préfecture de Saumur sous
C.P.P.A.P. n° 62 532. !! le N° 2523 bis - J.O. 23 mai 1977)
Directeur: René-Claude Colas !! par le Prieuré St-Martin
Directeur-délégué: !! 77610 LA HOUSSAYE EN BRIE
René-Jean Marmou !! FRANCE